

# Magnæ Deus potentiaë

## Brevier-Himno

Ordinara tempo > 1-a kaj 3-a semajno > jaŭdo > vespera laŭdo

*Magnæ Deus potentiaë,  
qui ex aquis ortum genus  
partim remittis gurgiti,  
partim levas in aera,*

El akvoj Vi, potenca Di',  
vivaĵojn kreis en ĉi tag',  
ke parte ili en la mar'  
kaj parte vivu en l' aer'.

*Demersa lymphis imprimens,  
subvecta cælis irrogans,  
ut, stirpe una prodita,  
diversa pleant loca:*

La fiŝoj en la ocean',  
la birdoj alte sub ĉiel',  
venintaj el la sama font'  
diversa-loke setlas nun.

*Largire cunctis servulis,  
quos mundat unda sanguinis,  
nescire lapsus criminum  
nec ferre mortis tædium,*

Ni, ĉiuj Viaj, petas Vin,  
savitaj, Krist', per Via sang',  
ke ne glitigu nin kulpem',  
nek spertu naŭzon ni de l' mort'.

*Ut culpa nullum deprimat,  
nullum levet iactantia,  
elisa mens ne concidat,  
elata mens ne corruat.*

Neniun premu ajna ŝuld',  
orgojlo ne tro-levu nin,  
ke ne kolapsu sub deprim'  
aŭ falu pro arog' la mens'.

*Præsta, Pater piissime,  
Patrique compar Unice,  
cum Spiritu Paraclito  
regnans per omne sæculum.*

Al Vi, ho Patro, estu glor'.  
Kun Via sam-substanca Fil'  
kaj kun la sankta Paraklet'  
Vi regas nun kaj en etern'.

*Amen.*

Amen.

latina T: eble de papo Gregorio la 1-a,  
la Granda (540-604)

E: Albrecht Kronenberger 2008